

Eduka valoro de la fido en la herooj

Claude Gacond, 93-a radioprelego, 1964.09.09 & 12

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtunda Radiostacio pri la eduka valoro de la fido en la herooj. Vi aŭdas Claude Gacond.

Hodiaŭ la instruistaro konstatas, ke ĝenerale la junularo perdas sian fidon en la valoro de la homo. Tamen la instruistaro konstatas, ke tiu sama junularo havas grandan soifon povi fidi je iu. Sed tiu iu al ĝi ofte mankas.

Kiam mi studis la germanan, mi havis la ŝancon vivi dum unu jaro en la berna oberlanda montaro en la lernejo *Ecole d'Humanité* de Paulus Geheeb en la vilaĝo Goldern. Mi tiam estis dekseksjarulo, kiu soifis je fido en la homo kaj vivo. Kaj mi ankoraŭ tre bone rememoras, kiun influon havis sur min galerio de portretoj de grandaj homoj. Paulus Geheeb provis konduki siajn gelernantojn al la admiro de la kuraĝaj vivoj de la herooj de la homaro. Li pensis, ke la junularo soifas je la kulto de la herooj. Sed li elektis la heroojn, prezentante al ni homojn, kies influo sur la disvolviĝo de la historio estis unue tuj rimarkebla kaj due spirite pozitiva.

La germanaj geaŭdantoj eble jam aŭdis la nomon de Paulus Geheeb, la fondinto de la fama Odenwaldschule, kiu ekde la komenco de la naziismo kuraĝis forlasi sian edukejon por rekomenci en Svislando sian edukistan karieron. Malfacilajn jarojn li tiam konis. Estis kriza epoko. Sed pacience Paulus Geheeb restarigis ĉirkaŭ si grupon de edukistoj, kaj post diversaj translokiĝoj retrovis taŭgan domaron, por instrui infanojn kaj gejunulojn laŭ siaj konceptoj. Malgraŭ sia granda aĝo, li tiam estis sepdekokjara, li havis sur nin ĉiujn grandan moralan influon. Dum la dimanĉaj vesperoj li grupigis siajn gelernantojn kaj geinstruistojn en la granda ĉambro por prezenti al ni la vivon kaj la penson de kelkaj el tiuj homoj, kies bildoj troviĝis sur la vandoj de lia ĉambro aŭ en diversaj aliaj lokoj : koridoroj, kursejoj. Li instigis nin legi biografiojn. Kaj tiujn librojn li estis deponinta en la lerneja biblioteko.

Tion farante Paulus Geheeb alportis al ni fidon en la homoj kaj en la vivo. Li donis al ni sekvindajn kaj sekvendajn ekzemplojn. Li riĉigis nin por la tuta vivo. Kaj kiam mi revenis al mia urbo Neuchâtel por frekventi la gimnazion, mi ne nur havis la impreson esti akirinta bonan konon de la germana lingvo, mi ankaŭ havis la impreson esti spirite pli riĉa, ol miaj kamaradoj. Dum ili kuradis are por admiri la tiam modajn heroojn, mi povis fidi sur pli solidaj fundamentoj. Mi eĉ konstatis, ke dum la tri jaroj de la gimnaziaj studoj la herooj de miaj kamaradoj konstante ŝanĝiĝis kaj ofte subite falis en la forgesemon, dum la miaj montriĝis pli kaj pli universalaj.

La studantoj havas la eblecon iom post iom distingi la verajn universalajn valorojn el la efemeraj propagandataj modoj. Preskaŭ ĉiuj miaj kamaradoj malkovris iom post iom sian pensgvidanton en imitinda verkisto, filozofo aŭ sciencisto. Ili tiam forlasis la diskutojn pri la sportaj konkursoj kaj plej lastaj diskoj por paroli pri malpli supraĵaj aferoj. Ilia vivo estis lumigata de interna lumo. Nia komuna malkovro tiam estis, ke tiu lumo estas universala. La sama forto, kiun ni malkovris en ni, ni ĝin malkovris en la vivo de aliaj homoj, pere de iliaj agoj kaj verkoj.

Ni tiam komprenis nian privilegion. Dum niaj studoj ni povis kontakti homojn. Sed tiuj, kiuj nur frekventis la devigan lernejon plej ofte ne povis renkonti homojn. Ekzistas esceptoj. Vi ĉiuj memoras pri instruistoj, kiuj alportis al siaj gelernantoj pli ol tion, kion la programo antaŭvidis. Sed kutime, ĉar en la programoj oni ne inkludas la studon de la vivo kaj penso de kelkaj grandaj homoj, la lernejo ĝenerale kontentiĝas nur tuŝeti al tiuj vivoj. Tiuj infanoj, kiujn oni ne nutris al la fonto de la vivo dum ili estis malfermitaj al ĉiuj influoj, trovas de si mem la heroojn, kiujn la propagando modigas. Ĉar ili estas kritikemaj, ili baldaŭ malkovras la fadenojn de la propagando. Ili vidas, ke ilia sporta stelo estis pagita, ili rimarkas, ke la tiom

Eduka valoro de la fido en la herooj
Claude Gacond, 93-a radioprelego, 1964.09.09 & 12

ŝatataj diskoj post kelkaj jaroj eksmodiĝas, ĉie ili vidas profite monavidemon. Ili perdas sian fidon en la valoro de la homo, kaj eĉ de la vivo.

Kiam oni instruas infanojn, kaj eĉ subkapablajn infanojn, kaj kiam oni provas prezenti al ili la vivon de grandaj homoj, oni malkovras ĉe ili grandegan intereson por tiuj herooj. La libron, kiun oni legas ĉiutage en la lernejo fariĝas temo de multaj simplaj diskutoj. Ofte la infanoj, post la finiĝo de la libro, petas ĝin por individua relego. Oni eĉ rimarkas, ke la infanoj aĉetis la legatan libron kaj ĝin trankvile relegas hejme tagon post tago.

En la elementa instruado oni devas fari multajn tedajn gramatikajn ekzercaĵojn, diktaĵojn. Kial ne elekti kiel tekstojn, erojn de la studata libro, parolojn de la admirata heroo, parolojn kiujn la infanoj povos belskribi sur dekoraciitaj folioj dum la leciono pri desegnado kaj skribado. Ĉar ili metos multon el si en tiuj laboroj, ili emos konservi tiujn laborojn kaj reveni poste al tiuj herooj. Tiuj infanoj povos fidi en heroo vivo. Ili povos imiti belan vivon. Ili estos sur vojo, kiu kondukos ilin pli facile malkovri la verajn homajn valorojn.

Dum multaj jarcentoj, kiam la religiaj kredoj plenigis la penson de la homoj, la vivo de la bibliaj patriarkoj aŭ de la ekleziaj sanktuloj donis al milionoj da kredantoj firman kaj komunan fidon je io universala. Hodiaŭ la bibliaj patriarkoj kaj la ekleziaj sanktuloj perdis sian influpovon. Kiuj herooj ilin anstataŭos ? Jen la temo de nia venonta prelego.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la eduka valoro de la fido en la herooj.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-